

TRILANDA KURIERO


Organo de la ESPERANTISTA RONDO AACHEN-Germanio



Redaktas Claus J. Günkel, Moosweg 36
D - 5180 Eschweiler
Telefona 02403 28951

Numero 12
1a jartriono 1987
10.7.1987

ESCHWEILER



NOTHBERG

TRILANDA RENKONTIGO
16 + 17 MAJ 1987



PROGRAMO


sabaton, la 16an de majo

9.00 akcepto (Ki)
10.30 laborkunsido I (Ki)
11.30 laborkunsido II (Ki)
12.30 tagmanĝo (Ki)
13.30 foriro (Ki)
14.00 ekskurso (No)
16.00 kafopaŭzo (Ki)
17.00 prelego I (Ki)
18.30 vespermanĝo (Ki)
20.00 distra vespero (Ki)

dimanĉon, la 17an de majo

9.00 matenmanĝo (Ki)
11.00 katolika meso (St)
12.30 tagmanĝo (Ki)
13.30 prelegoj II/III/IV (Ki)
15.30 promenado k adiaŭo

Ki = Killewittchen
No = duonruino Nothberg
St = preĝejo St. Barbara, Stich



Kontaktaĉreso
Claus J. Günkel
Moosweg 36, D-5180 Eschweiler
xx 49 2403 28951

Kunvenejo
Ferienheim Killewittchen
Bohler Heide 7
Eschweiler

ALVENO: ● Bicikle. Federacia Ĥoseo B 264: Köln - Kerpen - Düren -
- Langerwehe - Eschweiler - Broichweiden (Würselen) - Aachen.

● Aŭte. Vidu la ĉi-kunan faltfolion.

● Trajne. Anoncu sufiĉe frue, ke vi venos trajne por esti al-
portota. Eliru ĉe la ĉefstacidomo "Eschweiler Hbf".
Vi povos alveni en Eŝvajlero sabate/dimanĉe je tiuj ĉi horoj
inter la 7a kaj la 22a (aliohore bv. ne alveni):
(X = nur sabate, † = nur dimanĉe) (La horaro estas sen garantio.)
De Aĝeno (Aachen Hbf): 7.10 X, 7.45, 8.08, 8.34, 9.02, 10.13,
11.00, 12.32, 13.04, 13.31 X, 14.11, 14.38 X, 15.02, 16.03,
16.47 X, 17.08 †, 17.26, 18.08, 18.44 †, 19.32, 19.55, 20.58.
De Kolonjo (Köln Hbf): 7.21, 8.03 X, 8.10 †, 8.28 X, 10.27,
10.56, 12.00, 12.27 X, 13.15, 14.01, 14.47, 16.07, 16.41,
17.13, 18.25, 19.22 X, 19.55, 21.16.



PREZOJ: Nek estas kotizo nek ia pago por la programo aŭ por la ekskurso.
Nur la manĝoj kaj la tranoktado en la kunvenejo estas pagendaj.

! 	SPECIALA OFERTO !!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!		
	I, II, III kaj IV ĈIO INKLUZIVE KOSTAS NUR.....	15,- DM	25,- DM

Vi ĉiukaze pagos NUR SURLOKE.
Pro organizaj kialoj ni petas vin, bonvolu sendi vian aliĝilon
aŭ almenaŭ telefoni al la menciita adreso ĝis la 10a de majo.
Koran anticipan dankon!

TELEFONO: En la kunvenejo mem ne estas telefono. Apud la kunvenejo
estas trinkejo, kies posedanto nomiĝas Hirtz. En urĝaj
kazoj vi povas telefoni al tiu trinkejo. Sabaton ek de la
8a matene ĝis la 12a tagmeze iu el la LKK estos en la
trinkejo Killewittchen ĉiun duonan horon. Se vi parolas la
germanan, vi povas ankaŭ telefoni intertempe.
Jen la numero de la trinkejo: xx 49 2403 23897.



LABORKUNSIDOJ: i.a. pri la venonta TLR kaj aliaj trilandaj aferoj
kaj pri TriLA, la ĵus komencita "Trilanda Arkivo". Ĉiu
bv. kunporti fotojn, memoraĵojn, leterojn, invit-
ilojn ktp. pri estintaj Trilandaj Renkontiĝoj, ĉar
oni intencas verki ion pri ilia historio.

EKSKURSO: Ni vizitos la duonruinon de la kastelo de Nothberg. Tie ni
rigardados la konstruaĵon, esploros la kastelan ĉirkaŭejon
kaj ĉeestos arĥeologiajn laborojn - ĉio gvidate. Desegnaĵoj
pri la kastelo el la 13a jarcento kaj pri ties fundamento
troviĝas sur la titola pago. Cetere la konstrumaniere estas
unika en Mezeŭropo.

PRELEGOJ: i.a. "Strategio de la Esperanto-Movado", "Paroli sen eraroj
estas pli facile ol paroli kun eraroj".

KATOLIKA MESO: Ĝi okazos dulingve en kuncelero dum la kutima familia
meso dimanĉon je la 11a. Ankaŭ ne-katolikoj kompreneble
estas kore bonvenaj. La preĝejo St. Barbara situas en la
strato Friedrichstraße en la kvartalo Stich.

PROMENADO: Killewittchen situas tute meze en la Eŝvajlera urba arbaro,
kiu jam apartenas al la norda parto de la Ejjelo. Vidindaj
lokoj por tien promeni estas la arbara restoracio Bohler Heide
kun cervoparko, la arbaraj lagoj, la muelilo de Gressenich,
la regiono Korkus kaj la proksima ŝtonto "Schwarzer Berg",
kiun oni oficiale povas grimpi per ŝtuparo kaj de kiu oni
povas vidi la tutan ĉirkaŭejon - je tagoj kun bela vetero eĉ
vidi ĝis Kolonjo (55 km).

TRANOKTADO: En la kunvenejo estas 6 dormĉambroj por po inter 1 aŭ 6 per-
sonoj. La nombro de personoj po ĉambro dependas de la nombro
de partoprenantoj, kiuj deziras tranokti. Ĉiu ĉambro estas
hejtebla, havas ŝrankon kaj du ĉambroj eĉ estas kun propraj
lavaboj. Ankaŭ estas lavĉambro kun multaj lavaboj kaj tri
duŝiloj. Se multulte da personoj intencas tranokti, ankaŭ
estas amasloĝejo por ĉirkaŭ 20 personoj - do ne timu tra-
nokti, ĉar estos sufiĉe da loko por ĉiu. Se tiuj kondiĉoj
ne plaĉas al vi, indiku tion por ke ni menu hotelan ĉambro
por vi.



Kunportu dormsakon aŭ litajon kun kuseno, ĉar ni nur havos
litajn stablojn kaj matracojn.
Se vi intencas tranokti, nepre nepre sendu al ni vian aliĝ-
ilon aŭ almenaŭ telefoni al xx 49 2403 28951 ĝis la 10a de
majo 1987. Dankon!

DISTRA VESPERO: Surprizo!!!

SE VI INTENCAS KONTRIBUI ION AL LA PROGRAMO DE LA TRILANDA RENKONTIĜO,
EKZ. LABORGRUPON, PRELEGON Aŭ PROGRAMERON DUM LA DISTRA VESPERO, BONVOLU
INDIKI TION PER VIA ALIĜILO.


CETERE: La ekskurso tra la akvobaraĵo DREILÄGERBACHTALSPERRE (indikita en
Trilanda Kuriero n-ro 11) ne eblos. Anstataŭ tio nun la kastelo.

PROGRAMO DE LA KUNVENOJ	- Esperantista Rondo Aachen
	7 maj Close: Vojaĝo tra Portugalio
	4 jun Demarche: "Valonaj legendoj" de M.LaG.
	2 jul temo decidota
	-Verviersa Esperanto-Grupo
	28 apr Demarche: Kelkaj belgaj rakontoj
	12 maj Film-vespero: Dum 20 jarcentoj (EK)
	26 maj programo de la venontaj kunvenoj
	9 jun Esperanto-ludoj kaj 'Ĝis revido'
	-Junulara Esperantista Indeana Ligo
	Lernkursoj kaj planoj pri la Internacia Kar- navala Semajno februaron 1988. La nova lim- aĝo de JEIL estas 30.



KARNAVALO EN BAR-LE-DUC

De la 27a ĝis la 29a de marto ĉe-
estis esperantistoj tiun feston en
la belega ĉefurbo de la francaja
departemento Mozo. Ne venis tiom
multe kiel kutime, sed tio tute ne
malhelpis festi, amuziĝi kaj sper-
ti grandiozan atmosferon kaj etos-
on. Vivante en la malnova kvartalo
geamikoj el 3 landoj (B,D,F) dan-
cis, ridis kaj ŝvitis dum la gran-
da balo ĝis la 5a matene (malgraŭ
l' somertempŝanĝo), ĝuis la vid-
indaĵojn (ekz. muzeon, horloĝturon
kaj malicajn hundojn), varbis nov-
ajn adeptojn kaj miksiĝis inter la
karnavalumantaron plenplenigantan
la tutan centron kun procezioj,
spektakloj kaj multe multe multe
da konfetoj. Ĉu necesas menciigi ke
plaĉis al ĉiu? c.j.g.



ALIAJ ARANĜOJ EN NIA REGIONO

- 26 apr OLNE "Internacia Tago de la Malfermitaj Pordoj"
s-ro Rabosée, 10 rue Fosses-Berger, B-4641 Olne
- 12 maj VERVIERS Esperanto-filmo "Dum Dudek Jarcentoj"
Jean-Marie Jacques, Pl. Verte 23-bte 3, B-4800 Verviers
- 16/17 maj ESCHWEILER "Trilanda Renkontiĝo" tradicia!
- 30 maj EUPEN "Jubilea Festo"
Club Esperanto, rue de Verviers 101, B-4700 Eupen
- 30 okt/1 nov WAASMUNSTER "FLEJA-semajnfino" tradicia!
P. Haerick, M. Verdoncklaan 77, B-9219 Gent
(Waasmunster situas apud Antverpeno.)



La Verda Stelo

PROGRAMO MARTO + APRILO 1987

- 6/3 KVIZO "Konu vian lingvon"
kun Jules Verstraeten
- 13/3 INTERNACIA VESPERO:
"Terstrukturigo"
kun Bob Venhuizen (NL)
- 20/3 INTERNACIA VESPERO:
La IJK '86 en Israelo
kun Martin Haaze (D)
- 27/3 LABORGRUPOJ
- 3/4 GREENPEACE sin prezentas
far Martin Besieux en la
NEDERLANDA lingvo
- 10/4 INTERNACIA VESPERO:
"Rakonto de vojaĝanto"
kun Marco Dutra (Braz.)
- 17/4 Sankta Vendredo
Kunveno sen programo
- 27/4 LABORGRUPOJ

Antverpena Grupo
Frankrijklei 140
2000 Antwerpen
tel. |
03 |

Trilanda Renkontiĝo
Eschweiler 16+17 maj 87



-a Trilanda Renkontiĝo

ALIĜILO

Mi/ni aliĝas al la Trilanda Renkontiĝo.

familia kaj antaŭaj nomoj

strato _____ lando _____ poŝtkodo _____ loĝloko _____

Mi/ni venos per _____ . Mi/ni venos _____ -ope.

[Mi/ni venos per aŭto kaj havos _____ liberajn sidlokojn.]

Mi/ni tranoktos en la kunvenejo: _____ x. Mi/ni mangos en la kunvenejo: _____ x.

Mi/ni partoprenos la tutan programon inkluzive la ekskurson: _____ x.

Mi/ni ne partoprenos ĉi tion: _____

Mi/ni povas kontribui ĉi tion: _____

Mi/ni entute pagos surloke: _____ Aĝo(j): _____

("ne" ka "jes" = "x")

Dato Subskribo